

Sanskrito – hindeŭropa lingvo (1)

La temo de la proksima - la centa - Universala Kongreso estos "Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj". Ĉar antaŭ kelka tempo mi faris prelegon pri sanskrito - kiu ne estas moderna lingvo, sed estas lingvo kaj parenca al multaj modernaj lingvoj - mi intencis produkti sonartikolon pri ĝi. Pro tio mi surpriziĝis, kiam mi aŭskultis la artikolon de Anton de la 3-a de marto. La artikolo ne pritraktis sanskriton, sed kompreneble li menciis tiun lingvon en sia teksto pri la hindeŭropaj lingvoj. Se vi ankoraŭ ne aŭskultis aŭ legis ĝin, mi rekomendas fari tion.

En la artikolo de Anton kompreniĝas, ke sanskrito estas hindeŭropa lingvo. Li ankaŭ komprenigis, ke hindaj naciistoj asertas, ke la origino de la hindeŭropa lingvofamilio troviĝas en Hindio (Hindujo aŭ Barato), kaj li mem opinias: "Tie ĝi ne troviĝas, tiom klaras."

Tamen fakte estas lingvistoj (ĉefe hindaj, sed ne nur), kiuj defendas unu el du teorioj nomitaj "*Out of India*" [For el Hindio] kaj "Aŭtoktonaj Arjanoj". Tiuj teorioj estas tre similaj, sed ne la samaj. Ambaŭ asertas, ke la arjanoj – kiuj parolis pra-sanskritan lingvon – ne invadis Hindion, sed kontraŭe ĉiam vivis tie. Kvar elstaraj reprezentantoj de tiuj teorioj estas la nehindaj Konraed Elst (belgo) kaj la aŭtoroj de la libro *In Search of the Cradle of Civilization* [Serĉante la Lulilon de la Civilizacio]. Eble la plej fama aŭtoro, kiu kontestas tiujn teoriojn kaj kiu diferencas tri versiojn de ĝi, estas la germano Michael Witzel, profesoro ĉe la usona Universitato Harvard ekde 1986.

Necesas diri, ke estis diskonigataj pluraj aliaj teorioj pri la arjanoj kaj la hindeŭropaj lingvoj. Anton parolis pri nova teorio.

Mi ne estas specialisto, kaj ĉiukaze ne eblus prezenti ĉi-tie ĉiujn teoriojn. Pro tio mi prezentos la teorion plej ample kaj internacie akceptitan, eĉ de hindaj sciencistoj, precipe lingvistoj.

Laŭ tiu teorio vivis ĉirkaŭ 6000 jaroj a.K. inter la Kaspio kaj la Nigra Maro, norde de la montara ĉeno Kaŭkazo, popolo, kiu parolis proto- aŭ pra-hindeŭropan lingvon. Ekzistas neniu spuro de tiu lingvo, sed kelkaj sciencistoj provis rekonstrui ĝin (ekzemple la germano August Schleicher meze de la 19-a jarcento).

Kial oni uzas la terminon "hindeŭropaj lingvoj" (kaj "hindeŭropaj popoloj")? Ĉar estis eltrovite, ke la plejmulto da eŭropaj lingvoj kaj sanskrito (patrino de nuntempaj hindaj lingvoj) estas parencaj. Vidu la historion de tiu malkovro: Jam la antikvaj grekoj ekkonis Hindion, kiam Aleksandro la Granda invadis la nordon de tiu duonkontinento. Sed la grekoj ne perceptis tiun parencecon, inter alie ĉar ili ne interesiĝis pri aliaj lingvoj ol la sia kaj nomis ilin simple "barbaraj".

En 1498 la portugala esploristo Vasco da Gama alvenis al Hindio, kvazaŭ "malkovrante" ĝin. Poste multaj eŭropanoj vojaĝis al kaj vivis en Hindio.

En 1583 angla pastro perceptis kelkajn similaĵojn inter kelkaj hindaj lingvoj, la latina kaj la greka.

1585: itala komercisto perceptis similaĵojn inter la sanskrita kaj la itala.

1647: la nederlanda lingvisto van Boxborn perceptis similaĵojn inter pluraj eŭropaj lingvoj kaj la persa.

1686: germano publikigis latinlingvan libron, en kiu li defendis la ideon, ke estis estinta komuna pralingvo, el kiu devenis la persa, la greka, la kelta kaj la ĝermanaj kaj slavaj lingvoj.

1767: franca jezuito perceptis “strangajn analogiojn inter la sanskrita, la greka kaj la latina”.

Ĉiuj tiuj tekstoj ne estis diskonigitaj.

Sed en 1786 la angla juĝisto William Jones – vivanta en Hindio, kaj specialisto je orientaj lingvoj – faris prelegon, en kiu li montris la parencecon inter la sanskrita, la latina kaj la greka. Tiu prelego estis diskonigata kaj estas konsiderata la komenco de la kompara lingvistiko kaj de la studoj pri la hindeŭropaj lingvoj.

En 1818 la germana lingvisto Franz Bopp publikigis la unuan ampleksan historian-komparan studon pri sep hindeŭropaj lingvoj, pli ekzakte pri ilia gramatiko: la sanskrita, persa, greka, latina, litova, gota kaj germana.

Poste sekvis multaj aliaj studoj – ĝis hodiaŭ.

En iu proksima artikolo mi parolos pli specife pri sanskrito.